

Mahatma Gandhi en Svislando laŭ Romain Rolland
Claude Gacond, 265-a radioprelego, 1968.11.06 & 09

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Tiun ĉi aŭtunon malfermiĝas la jubileo Mahatma Gandhi. Kiel ni jam anoncis, la svisaj esperantistoj festos tiun jubileon en La Chaux-de-Fonds la 23-an kaj 24-an de novembro. Ni certe havos la okazon aŭdigi la voĉojn de la prelegantoj, kiuj parolos en tiu manifestacio.

A.- Ni pensas vin interesi tradukante por vi dum serio da elsendoj fragmentojn el la tagĵurnalo de Romain Rolland. Tiuj paĝoj rakontas pri la restado de Gandhi en Svislando. Jen la komenco de tiu traduko el la franca :

Cl.- « **Decembro 1931**

Fine alvenas la tiel longe atendita vizito de Gandhi. Ĝi estis prokrastita de monatoj al monatoj pro la malrapidemo de la diskutoj en la Konferenco de la Ronda Tablo.

A.- *Estas necese sin defendi kontraŭ leterpluvo, telefonoj kaj ĉiaj eblaj petoj. La alveno de Gandhi estas ilia kaŭzo. Inter ili oni rimarkas strangaĵojn, ridindaĵojn, eĉ veraĵn stultaĵojn.*

Cl.- *Italino skribas pere de mi al Gandhi por demandi al li la dek gajnontajn numerojn en la venonta loterio.*

A.- *La svisgermanaj nudistoj volus akapari Gandhi ; kaj estas necese lin defendi.*

Cl.- *Uloj kun perturbita cerbo, **Filoj de Dio**, sprucas el la tero kiel helikoj dum pluva vetero.*

A.- *Afablaj junuloj sin proponas por veni ludi dum la nokto arion per fluto aŭ violono sub la fenestro de la Mahatma.*

Cl.- *La **sindikato de la laktistoj de la lemana lago** majeste telefonas, ke ĝi intencas garantii la **proviantadon de la reĝo de Hindio** dum lia restado.*

A.- *La gazet-agentoj alvenas kaj tendumas ĉirkaŭ nia vilao.*

Cl.- *La policestraro en Lausanne maltrankviliĝas, ĉar la hoteloj en Villeneuve pleniĝas de **teduloj**, kiuj venas por gvati la strangan gaston.*

A.- *Romain Rolland daŭrigas skribante : Mi oferas al la juna japana skulptisto Takata la monrimedojn por veni el Parizo vidi kaj skizi Gandhi.*

Cl.- *Kaj nun li raportas pri la alveno mem de Gandhi : Gandhi forveturas el Londono la sabaton 5-an de decembro. Li prelegas en Parizo dum la vespero en mitingo organizita en Magic-City kaj loĝas ĉe nia amikino Louise Guieyese.*

A.- *Li ree forveturas la dimancan matenon kaj alvenas en Territet je la sesa vespere. Noktas kaj la vetero aĉas. Malbona sano malhelpas min iri lin renkonti. Apenaŭ mi povos eliri unu fojon el mia domo, dum li estos mia gasto, escepte por la rekonduko al la stacidomo en Villeneuve la forirtagon. Sed geedzoj Edmond Privat veturis ĝis Parizo por povi lin eskorti ; kaj mia fratino lin atendas en Territet.*

Cl.- *Sur la tuta svisa vojiro ekde Vallorbe, la doganejo, li estas festata. Ĉi tie la kuracistoj Niehans kaj Perret metis siajn aŭtomobilojn je lia dispono por la daŭro de lia restado. Sed li malmulte aŭ eĉ tute ne uzos ilin, li deziras uzi la plej simplan vetureblecon, la triaklasan sidlokon en la fervojo.*

A.- *Niaj vilaoj estas enkojnitaj en la Parko Byron, kiu nun apartenas al angla kolegio : **Chillon College**, kie restadas junaj burĝoj ege imperiismemaj. Ili bruege festadis la pasintajn tagojn pri la falego de la Laborista Partio dum la elektadoj.*

Mahatma Gandhi en Svislando laŭ Romain Rolland
Claude Gacond, 265-a radioprelego, 1968.11.06 & 09

Cl.- Tri kvaronhorojn antaŭ la alveno de Gandhi, tiuj junaj sinjoroj amasiĝas laŭlonge de la vojeto kaj sin fordonas al mokaj kaj vantaj ŝercadoj. Gojige la svisa popolamaso, kiu invadas la parkon, kaj la fotistoj kun siaj magneziaj eksplodoj estas invito por la etaj angloj al iom da retenemo ; kaj kiam la Mahatma alvenos, ĉio reduktiĝos al kelkaj voĉoj, kiuj el ombra angulo bone protektita en la komenco de la deklivo ekkantos, sen granda kuneco, la himnon **God save the King**.

A.- La morgaŭo la junaj sinjoroj estos mallaŭdataj en sia Kolegio, kaj ili estos tiel bone emociigitaj, ke oni ilin vidos vagadi ĉirkaŭ la vilao kun respektema scivolemo, nun tute konsciaj pri la graveco de la hinda gasto.

Cl.- Eĉ ilia direktoro, sinjoro Pym, venos solliciti aŭdiencon kaj petos Gandhi veni paroli en la Kolegio : kion Gandhi faros la vesperon de la antaŭtago de sia forveturo.

A.- Romain Rolland daŭrigas sian rakonton tiel : Ĉe la enirejo de la vilao Lionette, kie mi atendadas en humida mallumo apenaŭ heligita de elektraj globlampo, mi ekvidas la alvenon de Gandhi. En sia blanka burnuso, nudkapa sub la pluveto, nudgamba – liaj kruroj similas al magraj stilzoj – la etulo kun okulvitroj, sendenta, ridas al mi. Li ĉiam ridas spasme, kiam li min vizitas. Tiu rido estas kiel bonvena saluto, kiu akompanas la hindan riverencon : la manoj estas kunmetitaj kaj levitaj ĝis la buŝo.

Cl.- Kaj li apogas sian vangon kontraŭ mian ŝultron, kaj ĉirkaŭas min de sia dekstra brako. Kontraŭ mia vango mi havas la grizan kapon, la tonditan kranion kun raspa kaj malseka hararo. Estas la brakumado de Sankta Domeniko kaj Sankta Francisko.

A.- Sekvas Mira, kun sia fiera mieno kaj respektinda irado de Demeter. Postvenas tri hindoj : la du sekretarioj Mahadev Desai kaj Pyarelal, kaj juna filo de Gandhi, Devadas. Li estas tridekjara, sed oni donus al li nur dudek jarojn. Li havas rondan kaj ĝojan vizaĝon.

Cl.- Ni alsupras ĝis la unua etaĝo, kie ni pretigis por Gandhi la ĉambron, kiu posedas terason kaj tri fenestrojn : unu al la Rodana Valo kaj Monto Dents du Midi, la du aliaj, fenestro kaj vitra-pordo, al la vilao Olga kaj al la Lemana Lago.

A.- Preskaŭ tuj post interŝanĝo de kelkaj paroloj, Gandhi kaj la hindoj sidiĝas sur la planko, la kruroj interplektitaj. Mia fratino kaj mi sidas sur seĝoj. La elektra lumo estas estingita. Estas la preĝoj de la sepa horo.

Cl.- Gandhi faras ankoraŭ aliajn preĝojn kun siaj kunuloj je la tria horo matene.

A.- Tiuj preĝoj konsistas ĉiutage en sinsekvo de tri kantoj : antikvaj himnoj komponitaj por sanskritaj tekstoj, kiujn Gandhi tradukis en la hindan.

Cl.- La unua estas ĉerpita el la **Gita**. Konklude ĉiam la sama kantiko al Rama kaj Sita, kiun la varma kaj grava voĉo de Mira ekkantas kaj kiun la kunpreĝantaro ripetas rekante.

A.- Inter la du unuaj kantoj la unua multe similas al la malnovaj gregoriaj kantoj, la dua estas multe pli florumita. En ĝi enspirataj kaj vokaligitaj nazaloj alportas orientan noton ; nur lerte trejnita hindo kapablas ĝin kanti. Mira diris al mi, ke ŝi ne kapablas ĝin kanti.

Cl.- Tiuj belaj melopeoj, kiuj pace disaŭdiĝas en la nokto, estas interrompataj kaj sekvataj de absoluta silento, la lasta estas la plej longa. Kaj je la fino Gandhi mezvoĉe petas relumigon.

A.- Kaj Romain Rolland konkludas : Kaj la konversacio rekomenciĝas. La efeto estas impresiga; sed, kvankam mi apreas la belecon de la kantoj, mi sentas min fremda kaj indiferenta.

Mahatma Gandhi en Svislando laŭ Romain Rolland
Claude Gacond, 265-a radioprelego, 1968.11.06 & 09

Cl.- *Ili estu hinduaj aŭ kristanaj, tiuj ritaj preĝoj al Dio ne plu estas por mi. Ili akriĝas mian solecon.*

A.- Tiu interesa priskribo de la restado de Gandhi en Svislando estas traduko el la tagĵurnalo de Romain Rolland. La venontan semajnon vi aŭdos la unuan interparolon inter Gandhi kaj Romain Rolland.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-